



**Mirzo Ulugbek:
granda reĝo
de astronomio**

**Niĝerio:
Bonŝanca prezidanto**

**Nova politika
erao en Britio**

Stefan Maul

El verva vivo ĵurnalista



Faktoj kaj spertoj el la vivo de la ĉefredaktoro de



En la historio de Esperanto ofte ĵurnalistoj ludis sufiĉe gravan rolon. Unu el ili estas Stefan Maul, kiu dum 45 jaroj aktivas, verkante kaj redaktante. Li precipe konatiĝis kiel fondinto kaj multjara ĉefredaktoro de MONATO.

Kiel kaj kial li fariĝis esperantisto kaj ĵurnalisto, kiu batalas kontraŭ maljustaĵoj ĉiuspecaj, tion vi ekscias per tiu ĉi informriĉa kaj parte kortuŝa libro. Akompanu liajn ofte neordinarajn vivon kaj karieron de milit-infano ĝis la 25-jara jubileo de MONATO.

Prezo: 20,00 EUR + aŭfranko

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo:

Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

Aŭstrio : Nova malnova prezidanto

8

La 25an de aprilo 6 355 620 geaŭstroj rajtis voĉdoni por nova ŝtata prezidanto. El tiuj 50 % ne partoprenis la balotadon (2004: 38 %).

Kandidatis la socialdemokrato Heinz Fischer [hajnc fiŝa], la ĝisnuna prezidanto. Li naskiĝis en 1938 en Graz [grac]. Dum la diktatura periodo de 1938 ĝis 1945, kiam Aŭstrio estis parto de la Germana Regno, liaj gepatroj parolis antaŭ li nur en Esperanto por kaŝi sian opinion.

Britio: Nova politika erao

10

Post 60 jaroj Britio havas denove koalician registaron. Tutlandaj elektoj, okazintaj en majo, liveris parlamentan plimulton nek al la reganta Laborista Partio nek al la ĉefopozicia Konservativa Partio. Sekvis kvar tagoj da diskutoj, konjektoj, proponoj kaj kontraŭproponoj, ĝis fine estas anoncote, ke la nova registaro konsistas el koalicio inter la Konservativa Partio kaj la Liberal-Demokrata Partio.



Mirzo Ulugbek: granda reĝo de astronomio

14



En 2009, la Internacia Jaro de Astronomio proklamita de UNESKO, la mondo celebris la 615-jaran jubileon de la elstara sciencisto kaj ŝtatisto Mirzo Ulugbek.

politiko

AŬSTRIO	8
Nova malnova prezidanto	
BURUNDO	8
Problemo identigila	
OPINIO	9
Pordo al okcidento	
HUNGARIO	9
Nova vento	
BRITIO	10
Nova politika erao	
NIĜERIO	11
Bonŝanca prezidanto	
BELGIO	12
Vestaĵa verdikto	
ALBANIO	13
Suferas la ĉevaloj	

scienco

ASTRONOMIO	14
Mirzo Ulugbek: granda reĝo de astronomio	

moderna vivo

SANO	19
Ridinda kuracilo	
AŬSTRIO	19
Eleganta krimo	
UKRAINIO	19
Konga kozako	
UNIVERSITATOJ	20
Reformo fuŝita	
AŬSTRIO	20
Kompenso rel-ativa	
EŬROPA UNIO	21
Europeana: de Rejno al Danubo	
KONSTRUADO	22
Ŝtupoj al malplenaj poŝoj	
INSTRUADO	23
Kuraĝu malobei!	

libroj

Intervjue pri la grafo de Monte-Kristo	24
--	----

medio

AKVO	26
Monda akvo fluas en malbonaj direktoj	

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› Leteroj	6
› El mia vidpunkto	7
› Anoncetoj	27

► Rekto al la eldonejo ...

- > Per via FEL-konto.
- > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- > El Usono per ordinara usona ĉeko.
- > Per Visa aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- > Per Paypal al konto financo@fel.esperanto.be
- > Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj.

Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	25	28	15	5,5	9
Aŭstralio	AUD	87	92	52,2	9,5	15
Aŭstrio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5,5	9
Brazilo	EUR	25	28	15	5,5	9
Britio	GBP	44	47	26,4	5	7
Bulgario	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Ĉeĥio	EUR	35	38	21	5,5	9
Danio	DKK	366	396	219,6	41	65
Estonio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Germanio (ok.)	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Germanio (or.)	EUR	47	51	28,2	5,5	9
Grekio	EUR	47	51	28,2	5,5	9
Hispanio	EUR	47	51	28,2	5,5	9
Hungario	HUF	7400	8200	4440	1500	2410
Irlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Israelo	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1200
Kanado	CAD	78	84	46,8	9	14
Kipro	EUR	35	38	21	5,5	9
Koreio	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Kostariko	EUR	25	28	15	5,5	9
Kroatio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Latvio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Litovio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Malto	EUR	35	38	21	5,5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Norvegio	NOK	430	460	258	48	71
Nov-Zelando	NZD	105	111	63	11,5	18
Pollando	PLZ	115	126	69	23	36
Portugalio	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Rusio	EUR	25	28	15	5,5	9
Serbio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Slovakio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Slovenio	EUR	35	38	21	5,5	9
Sud-Afriko	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Svedio	SEK	499	543	299,4	56	84
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	14
Usono	USD	78	82	46,8	8	13
Baza tarifo	EUR	49	53	29,4	5,5	9

► aŭ pere de peranto ...

- > **Aŭstralio:** Libroŝerbo de AEA, 4/23 Albue-
ra Street, Battery Poooint Tas 7004, Australia.
Reto: libroŝerbo@esperanto.org.au.
- > **Aŭstria:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38,
3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744.
Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei
140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43).
Reto: financo@fel.esperanto.be.
- > **Brazila:** Brazila Esperanto-Ligo,
Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia.
Reto: bel@esperanto.org.br.
- > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de
Britio, Esperanto House, Station Road, Bar-
laston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE, Britio.
Reto: eab@esperanto-gb.org.
- > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III.,
290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto
de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100,
variab. symbol por gazeto Monato: 07001.
Reto: cea.polnický@quick.cz.
- > **Dana:** Revuŝerbo de DEA, Arne Casper,
Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 Køben-
havn Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45
21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- > **Estonia:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-
93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de
Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530
Helsinki, Finnlando.
Reto: eafoicejo@esperanto.fi.
- > **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis,
rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D
Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- > **Germanaj:**
> Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer
Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya, Kontonumero:
0 420 933 400, BGN: 290 400 90)
Reto: robo.espero@acn-mail.de.
- > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303
Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk
91856-676 (BLZ 54510067)).
Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
- > Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang
Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129
Mainz.
Reto: wolfgang.schwanzer@esperanto.de.
- > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio,
Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa
d'Enginyers, 3025-0002-47-1433276794).
Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- > **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest,
Bakatsu. 1/3III.1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9
Templeogue Wood, Dublin 12.
Reto: noviresp@eircom.net.
- > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio,
Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík.
Reto: esperant@ismennt.is.
- > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via
Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.:
37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- > **Japana:** Japana Esperanto-Instituto,
Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162.
esperanto@jei.or.jp.
- > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a
Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington,
Ottawa, Ontario K1H 8J4. Reto: yan@storm.ca
- > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601

- ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro
Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860
Reto: esperanto@saluton.net.
- > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981,
1000 San José. Reto: miaumiaul@ice.co.cr
- > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti
Duh 130, HR-10000 Zagreb.
Reto: marija@hes-keu.hr.
- > **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas
35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371
6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- > **Litova:** Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187,
LT-01003 Vilnius-C, Litovio.
Reto: laimiuslt@gmail.com.
- > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394
Olm (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111
0089 3612 0000).
Reto: wickler.albert@gmx.net
- > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg
176, NL-3015 BJ Rotterdam.
Reto: uea@inter.nl.net.
- > **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf
Schous vei 18, 0572 Oslo 5.
Reto: inform@esperanto.no.
- > **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date
Crescent, Christchurch 8025.
Reto: gdewar@ihug.co.nz.
- > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117
m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-
1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV
O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- > **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio,
R. Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500-239
Lisboa. Reto: portugala@esperanto.web.pt.
- > **Ruslandaj:**
> Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kalinin-
grad, ab. ja. 1248, Ruslando.
Reto: sezonoj@gazinter.net.
- > Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006
Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964.
Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.:
42301.810.3.0018.0084867.
Reto: mikaelo@km.ru.
- > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića
14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel.
+381-63-7200 616. Reto: zciric@eunet.yu
- > **Slovenaj kaj Slovakaj:**
> Višnja Brankovič, Via Parini 5, I-34129
Trieste. Reto: visnja.brankovic@os.htnet.hr.
- > Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130,
HR-10000 Zagreb.
Reto: marija@hes-keu.hr.
- > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview
Crescent, Milnerton Ridge, 7441.
Reto: beckford@telkomsa.net.
- > **Svedaj:**
> Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Espe-
ranto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123
52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@telia.com.
- > Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet
Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35
Hörby, Svedio.
Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
- > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn
6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7
Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
- > **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito,
CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1
510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

Misteroj

Ne malmultaj aferoj en la mondo estas misteroj por mi, ekzemple en fiziko. En la gimnazio kaj dum studado mi ĉiam havis sufiĉe da problemoj por kompreni ties karakteron kaj ĝiajn detalojn. Ĝis hodiaŭ mi miras pri multaj facetoj de fiziko.

Kun intereso tamen mi sekvis la instaladon de la esplorcentro CERN en Ĝenevo. Daŭris tre longe, ĝis fine ĝi vere funkciis; la mondo jam ridis pri la dum longa tempo vanaj klopodoj de tieaj fizikistoj realigi la projekton. Nun tamen ĝi marŝas. Temas pri tiel nomata partikloakcelilo, la plej granda iam ajn konstruita de homoj. En la maŝino oni pelas protonojn per rekordaj rapidegoj tra ronda tunelo por tiel esplori la estiĝon kaj strukturon de la universo. La esplorprojekto kostas tre, tre multe. Sole la konstruado voris tri miliardojn da eŭroj. Kaj kompreneble la salajroj

de la partoprenantaj sciencistoj kostas multe. Ĉu kelkaj rekordrapidaj protonoj pravigas tian koston? Kaj kiun gajnon tio eble alportos?

Nu, oni eble vidu la rilatojn al aliaj grandaj kaj gravaj esplorkampoj, ekzemple astronomio, genetiko aŭ spacveturado. Montriĝas, ke modernaj teleskopoj, kiujn oni instalas en la spaco, laŭ la kostoj estas kompareblaj kun CERN. Pri teleskopoj neniuj plendas, ĉar esplorado de la spaco estas ĝenerale homa intereso. Sed por vere kompreni la strukturon de la universo, supozeble oni bezonas ambaŭ sferojn, la makrokosmon kaj la mikrokosmon. Kaj la kosto de CERN relativigiĝas draste, se oni komparas la plej grandan impostmalŝparon de la lastaj jardekoj: la internacian kosmostacion. La sciencavaloro de tiu orbita loĝokontenero estas bagatela kompare kun ekkonoj per teleskopoj, marsrobotoj kaj do

partikloakceliloj. Ses provizoflugoj per la kosmopramo kostas same multe kiel la nova akcelilo de CERN. Ni ne scias, kiujn rezultojn ĝi vere alportos. Sed jam nun kelkaj inventaĵoj ligitaj al ĝi estas utilaj, ekzemple la sensoroblatoj en ciferecaj kameraoj.

En 1992 oni ĉe CERN inventis la tutteran teksaĵon – kiu ja memoras tion? Ĝenerale validas por fiziko: oni devas multon elprovi, eĉ se nur iuj aferoj vere estos utilaj. Ni prenu la relativitecon de Einstein [ajnŝtajn]. Li ne elpensis ĝin, por ke hodiaŭ aŭtomobilistoj helpe de navigaj sistemoj povu trovi siajn celojn. Sed sen la formuloj de Einstein ni ne havus tiajn praktikajn birilojn. Ni do trankvile atendu la esplorojn en Ĝenevo; supozeble ili ne estos vanaj.

Sincere via

Stefan MAUL



www.monato.net

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 31a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukaĵoj); represoj kaj tradukaĵoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-rajto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda kaj komputila (MPD) versioj de MONATO por blinduloj, mendu ilin pagante 15,40 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklee 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklee 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anoncitarifo: n-ro g; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts.
Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Julia Litvinova.

redaktoroj:

• **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.

• **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Vispaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

• **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

• **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.

• **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzellanlangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.

Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ.
Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** MONATO, Frankrijklee 140, 2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 6755 Mayfield Rd, Apt 312, Cleveland, OH 44124, Usono.
Telefono 440-646-1482.
Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librocenzonj oni ne sendu al la redaktoro proprajinitate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio.
Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** Slezák Tamás, Damjanich u.12, HU-9200 Mosonmagyaróvár, Hungario.
Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: moderna_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** sendu

viajn kontribuojn al la eldonejo:

Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklee 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.

Rete: politiko@monato.net.

• **Scienca:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono.

Rete: scienca@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando.
Rete: spirita_vivo@monato.net

• **Sporto:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklee 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: sporto@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzellanlangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.
Rete: turismo@monato.net.

Homarane

David Kelso en sia recenzo pri la n-ro 1 de *Homarane* (MONATO 2010/6, p. 24) skribis: „Armando Zecchin grave maltrafas, kritikante homaranismon kvazaŭ ĝi estus teologio, rivala al la dogmoj de lia amata Vatikano. Tute ne: Zamenhof estis plej bonkora idealisto, neniom teologo.”

Ne, mi ne kritikas homaranismon, mi kritikas certan interpreton de homaranismo, laŭ kiu Zamenhof celus per ĝi likvidi ĉiun apartan religion. Se tiel estus, li farintus gravajn erarojn. Mi deziris trovi inter la diversaj zamenhofaj redaktoj pri homaranismo – kaj post la kolokvo pri homaranismo, kies frukto estas *Homarane*, mi kredas, ke tio emerĝis –, ke Zamenhof opiniis, ke la diversaj „rakontoj” de la religioj „povas ne esti fantaziaj” (estas lia esprimo). Eĉ mi trovas, ke li konfesis ideojn, kiuj estas bazaj por ĉiu religio, kiel la devo sekvi sian konsciencon kaj la evidenteco de la natura morala leĝo, kiuj estas bazaj por la komuna akcepto de religioj kun homaranismo mem. Certe, Zamenhof ne celis esti filozofo kaj teologo, sed tiuj bazaj ideoj orientas la eventualan filozofian kaj teologian pensadon.

Armando ZECCHIN
Italia

Paradoksa aserto

Ĉu ne paradoksas aserti, ke pedofilio okazas ĉefe interne de familia rondo kaj samtempe sugesti la abolon de la sacerdota celibato kiel solvon al la plago de pederasteco en la katolika eklezio? Pluraj patroj, fratoj, avoj sekse perfortas infanojn, kvankam ili havas edzinojn, amatinojn kaj prostitutojn je dispono.

Envere pedofilio estas perversa. En la eklezio ne estu spaco por koruptantoj. La solvo ne estas allasi tiajn personojn en dioceajn seminariojn, dotante ilin per supozita, senutila elfluejo. Mi ne estas kontraŭ la eblo havi en la katolika eklezio geedziĝintajn pastrojn, sed la selektado de novaj sacerdotoj – sendepende de ilia familia statuso – devus esti ege pli severa. Kio gravas estas la integreco de la kandidatoj, kiu devas esti certa, kaj ne ilia civila statuso, kiu ne prezentas garantiojn.

Surprizas min ankaŭ, ke en Germanio oni forlasis kaj ankoraŭ forlasas la katolikan eklezion por tiu ĉi skandalo.


Tio estas kiel ŝanĝi preferatan futbalteamon post unu mizera sezono, post malvenko aŭ malpromociigo. Kia kredo estas tiu? Ĉu oni ŝanĝu eklezion, je la unua malfacilaĵo, kvazaŭ estus futbalteamo, biskvitmarko aŭ hararanĝo? Ĉu Jesuo mem sekse perfortis la infanojn? Kial do oni forlasu lian domon?

Roberto PIGRO
Kipro

Tri regionoj: unu eraro

Nome de la germanlingva komunumo de Belgio mi dankas al MONATO, ĉar ĝi tiel konsiderinde grandigis la germanlingvan teritorion ... (MONATO 2010-6, p.12) sed ĉu la loĝantoj de la nederlandlingva municipo Voeren estos kontentaj, pro tiu aneksado al la germana teritorio?

Jean Pierre VANDENDAELE
Eupen, germanlingva Belgio



La geografio de Belgio estas tiel komplika, ke eĉ grafikistino, loĝanta en Belgio, konfuziĝas. La plej supra sago en la mapo ne gvidas al la germanlingva komunumo, sed al la nederlandlingva enklavo Voeren ene de Valonio.

Tri regionoj: kelkaj precizigoj

Mire mi legis la artikolon rilate la novan politikan krizon de nia kompatinda lando (MONATO 2010/5, p.12-13). Mi ne konas la fontojn de Ivo Durwaël, sed mia opinio ne nepre necesas aldoni kelkajn precizigojn. Ekzemple, pri la fragmento dediĉita al industrio, veras ke en la 20a jarcento, ĝis la 50aj/60aj jaroj, Valonio estis forte industriigita, kaj ke pro tio centmiloj da flandroj tien migris por trovi laboron.

Ankaŭ veras, ke poste multaj ekloĝis definitive en sia nova laborregiono. Plie, dum 130 jaroj, je la nomo de la tutlanda solidareco, Valonio kontribuis al la disvolviĝo de Flandrio: disvolviĝo de la havenoj de Antverpeno, Gento kaj Zeebrugge, disvolviĝo de la flandraj aŭtovojoj antaŭ la

valonaj ktp.

Tamen, kiam Flandrio poste ekriĉiĝis, ĝi rifuzis preni sur sin siavice la kontribuan rolon, interalie helpante la valonan ferindustrion. Kial tia sendankeco? Mi ĵus legis la opinion de Bart Maddens, politologo ĉe la universitato de Loveno (flandra, do ne suspektinda). Li skribas: „De pli ol ducent jaroj, la flandroj luktas por alkroĉiĝi al siaj lingvo, minoritata, kaj kulturo, malgraŭ tio, ke la franca lingvo, internacia, disvastiĝas pli kaj pli. Eble la flandroj sukcesos bremsi tian movadon, sed neniam ili haltigos ĝin.”

Krome, ĉu iu jam aŭdis valonon ekkrii nepunate, kiel iuj flandroj: „Belgio krevu!”, aŭ vidis iun bruligi la ŝtatan flagon?

Gustave LIGOT
Belgio

Sukcesa senpaga transporto

Dankon pro la aperigo de la artikolo „Senpaga transporto danke al loĝantarkonsciiĝo” (MONATO 2010/3, p. 18-19). Post unu jaro da funkciado oni konstatas, ke la nombro de vojaĝantoj altiĝis je 71 % (planitaj estis +50 % post du jaroj). Eĉ la lernejanj aŭtobusoj iĝas pli sukcesaj: +20 %; necesis aĉeti 18 pliajn aŭtobusojn. La publika investo sumiĝas je 1,1 milionoj da eŭroj, al kiuj kontribuis retropago de la entreprenoj. Kalkulita estas nur la publika investo, ne la ŝparo fare de la uzantoj, nek la gajno por la medio.

Renée TRIOLLE
Francio

La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaj artikoloj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de MONATO.

Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Ŝuldoj kaj kulpoj

Stefan MAUL

Ĉu vi komprenas tiun financ-tohuvabohuon? Mi ne, ne vere. Svarmas fakterminoj kaj strangaj vortoj kiel transakcio, financ-ĵonglistoj (kiuj vetas kontraŭ ŝtatoj – kiel funkcias tio?), kreditoj, ŝuld-amortizo, financ-akrobatoj, investobankoj, ŝuld-atestoj, obligacioj, kreditoroj, debitoroj, ŝuldonuligo, deficitlandoj kaj – fi! – spekulistoj. Kaj temas pri astronomiaj sumoj: sole la eŭro-landoj kaj Internacia Mona Fonduso (IMF) disponigas 750 miliardojn (en ciferoj 750 000 000 000) da eŭroj por EU-ŝtatoj, kiuj perdas kreditindecon. Oni nomas tion „protekt-ombrello”; per ĝi oni volas savi ŝuldoŝtatojn kaj la komunan valuton eŭro de detruo.

Anonimaj fortoj

Kies mono estas tiu, kiun garantias EU kaj IMF? Nia, ĉar se la sistemo ne funkcias, ni impostpagantoj garantias, vole-nevole, tiun gigantan sumon. Aŭ ĉu mi miskomprenis ion? Oni klarigas al ni, ke nur tiamaniere ni povas savi nin de ĝenerala bankroto kaj ruinigo de eŭro. Momenton! Ĉu ne ĉiuj nelacigeble asertis, ke eŭro estas tre stabila valuto, eĉ pli ol usona dolaro? Kiuj kiel povas ruinigi ĝin? „La diablaj spekulistoj”, oni blasfemas. Sed kiuj estas tiuj potencaj spekulistoj? Neniu vere konas ilin, ili estas fakte anonimaj. Ŝajnas, ke ne estas kelkaj aŭ pluraj personoj, sed tuta bando de bankistoj, kiuj senhonte profitas de la financa malforteco de ŝtatoj. Kaj ĉar ili estas tiel anonimaj, oni des pli terure kaj histerie timas ilin. Onidire plej multaj el ili sidas en bankoj kaj asekuraj kompanioj en Nov-Jorko, sed neniu ŝajne povas pruvi tion.

Sed politikistoj skurgas la spekulistojn kiel verajn kulpulojn pri la finank-krizo. Sveda finanĉministro Anders Borg karakterizis ilin „luparo”, germana finanĉkontrolisto parolis pri „agres-

Kion politikistoj tamen ne diras, estas la fakto, ke tian spekuladon ebligas la kapitalisma sistemo, kies plej alta principo estas, ke oni aplikas la regulojn de la merkato: mi eluzas la eblecojn, kiujn disponigas la merkato por profiti laŭeble multe, por maksimumigi mian gajnon je la kosto de ĉiuj aliaj.

milito de spekulistoj”. Kion politikistoj tamen ne diras, estas la fakto, ke tian spekuladon ebligas la kapitalisma sistemo, kies plej alta principo estas, ke oni aplikas la regulojn de la merkato: mi eluzas la eblecojn, kiujn disponigas la merkato por profiti laŭeble multe, por maksimumigi mian gajnon je la kosto de ĉiuj aliaj. La spekulado kontraŭ ŝtatoj kiel la preskaŭbankrota Grekio simple ekspluatas ilian nekapablon repagi siajn gigantajn ŝuldojn. Ju pli malfacile estas por la ŝtato amortizi ŝuldojn, des pli altaj estas rentoj por novaj kreditoj (aktuale ĝis 20 %), ĝis la ŝtato kolapsas. Jure tio estas en ordo, moralo ne estas afero de kapitalismo.

Krima negocado


La EU-landoj kune havas ŝuldojn de 9 bilionoj (= 9000 miliardoj) da eŭroj; Usono, monde plej granda ekonomia regiono, eĉ 13 000 miliardojn. La ŝtatoj dum longa periodo de paco kaj prospero vivis je la kosto de la estonteco, kredante ke la ekonomio konstante kreskos, ili akumulis ŝuldojn kaj tiel igis sin dependaj de internaciaj kreditoroj. Nun ĉiuj lamentas pri spekulado. Tiun ĉi germana (katolika) ekonomikisto Oswald von Nell-Breuning [oswald fon nelbrojning] jam antaŭ multaj jaroj karakterizis kiel „en plej alta grado socidamaĝan” kaj kiel „krimon kontraŭ la

homaro”. Krimon oni povas kaj devas puni. Kial do ne jam delonge oni leĝe malpermesis tian kriman negocadon? Nur nun iom hezite oni diskutas pri tio.

Kiu kulpas?

Dume la gigantaj ŝuldomontoj estas kaj restas rekta invito al spekulistoj ekspluati la situacion. Ĉu do vere kulpas spekulantoj? Tio estas nur la duona vero; la alia duono estas, ke la ŝuldoŝtatoj mem kulpas pri la krizo. Ne nur ĉar ili ne leĝe malpermesas spekuladon, sed ankaŭ ĉar ili simple ne resolidigas siajn buĝetojn. La EU-komisiono permesis al siaj membroŝtatoj atendi ĝis la jaro 2013 por redukti siajn ŝuldojn sub la permesatan limon – multe tro longa tempo. Precipe malstabilaj ŝtatoj, kiaj estas Portugalio, Irlando, Hispanio kaj eventuale ankaŭ Italio, devas resanigi siajn financojn pli frue, por konvinki la finanĉmerkatojn.

Kiel ajn, kulpas pri la finankkrizo kaj la spekulistoj kaj la kapitalisma sistemo, sed precipe la registaroj, kiuj blindas por la sekvoj kreis ŝuldomontojn. Urĝe ili do devas ebenigi tiujn montojn, kaj due urĝe fari leĝojn por malebligi daŭran spekuladon je damaĝo de la homaro, precipe de niaj nepoj. Se tio ne okazos, ili perdos ĉian perspektivon por homdigna vivo. ■



WALTER KLAG

AŬSTRIO

Nova malnova prezidanto

La 25an de aprilo 6 355 620 geaŭstroj faritis voĉdoni por nova ŝtata prezidanto. El tiuj 50 % ne partoprenis la balotadon (2004: 38 %).

Kandidatis la socialdemokrato Heinz Fischer [hajnc fiŝa], la ĝisnuna prezidanto. Li naskiĝis en 1938 en Graz [grac]. Dum la diktatura periodo de 1938 ĝis 1945, kiam Aŭstrio estis parto de la Germana Regno, liaj gepatroj parolis antaŭ li nur en Esperanto por kaŝi sian opinion.

Valoroj

Fischer mem ne parolas Esperanton kaj ne subtenas la lingvon. Li studis juron, aktivis politike kaj iĝis prezidanto unuafoje en 2004 (52 % de la voĉoj). Nun li kandidatis kiel sendependa persono kaj pledis por „valoroj” sen specife diri pri kiuj. La Verda Partio oficiale subtenis lin.

La dua laŭ aboco estis Rudolf Gehring [gering], la estro de la Kristana Partio. Li subtenis geedziĝon kaj familion kaj kontraŭis samseksemon.

Sekureco

Kiel tria kandidatis Barbara Rosenkranz [rózenkranc] de la Libereca Partio. Ŝi favoris familion, gepatran landon, sekurecon kaj Eŭropan Union. Sur afiŝoj ŝi aperis kiel „forta virino”.

Ofte oni atakis ŝin kiel dekstregan pensanton. Kunlaboranto de la „sendependa” aŭstra televido ORF eĉ donis monon al junaj viroj, por ke tiuj vestu sin kiel nov-nazioj kaj parolu tiuspecajn sloganojn. Dum televid-elsendoj oni falŝis ŝiajn citaĵojn.

La rezulto: Fischer 79 %, Rosenkranz 16 %, Gehring 5 %.

Walter KLAG

Kandidatis tri politikistoj por fariĝi prezidanto de Aŭstrio: de maldekstre Heinz Fischer, Barbara Rosenkranz kaj Rudolf Gehring.

BURUNDO

Problemo identigila

Laŭ la burunda konstitucio ĉiu civitano pli ol 18-jaraĝa posedu ŝtatan identigilon. Tamen evidentis, dum registrado por balotoj en majo, ke preskaŭ duono de la 3 550 000 voĉdon-raĵtigitoj ne havis kun si identigilon.

Kulpas la fakto, ke la plimulto de la burundanoj scipovas nek legi nek skribi. Ili ne komprenas la gravecon de dokumentoj tiaj. Nur komercistoj kaj vojaĝemuloj ilin posedas pro postuloj de polico aŭ bankoj. Krome rifuĝintoj el Tanzanio, kiuj lastatempe hejmenrevenis, aldoniĝas al la nombro de tiuj sen identigiloj.

Malgraŭ tio, multaj homoj raportas, ke fraŭdemuloj provas akiri multajn identigilojn, por voĉdoni pli ol unu fojon.

Jérémie SABIYUMVA

Pordo al okcidento



Ĉina restoracio en Hungario. Nuntempe ĉinoj volas profiti de hungaraj ligoj kun aliaj eŭropaj ŝtatoj.

La eŭropa enirejo: tiel taksas ĉinoj Hungarion. Eble troas diri, ke ĉinoj opinias hungarojn la unusola parenca popolo en Eŭropo, sed fakto estas, ke la ordo de hungaraj kaj ĉinaj personaj nomoj identas, ke la distribuo de sango-grupoj de hungaroj kaj nordaj ĉinoj samas kaj ke konstateblas simileco en popolmuziko kaj en popolarto ankaŭ en norda Ĉinio.

Fine de socialismo ĉinoj are alvenis en Hungarion. Ili komence kuiris en ĉinaj restoracioj kaj komercadis. Ĉinaj varoj iĝis popularaj inter malriĉaj hungaroj. Laŭ opinisondadoj, hungaroj taksis ĉinojn la plej bona popolo inter ciganoj, slovakoj, rumanoj kaj aliaj vivantaj en Hungario. En Hungario vivas granda ĉina kolonio. Ankaŭ la Banko

de Ĉinio funkcias en Budapeŝto, kio estas unika en la regiono.

Lernejo

Dulingva lernejo estas fondita en Budapeŝto kaj do, spite lingvajn malfacilaĵojn, naskiĝis nova generacio dulingva. Por ĉinoj la hungara lingvo estas tiel malfacila kiel la rumana aŭ la ĉeĥa.

La ĉina registaro alte taksas la hungaran kontakton, ĉar Hungario apartenas al Eŭropa Unio, membras en la t.n. Schengen-grupo (eŭropaj ŝtatoj, inter kiuj ne ekzistas landlimaj kontroloj) kaj verŝajne baldaŭ en la eŭro-zono. Pro tio ĉina kompanio planas konstrui fabrikon en Hungario por munti aŭtobusojn.

Karlo JUHÁSZ

Nova vento

Trablovas Hungarion nova politika vento. Parlamentaj balotoj en aprilo forbalais ok jarojn da socialista regado. La malvenkon kaŭzis ne nur la ekonomia krizo sed ankaŭ korupto.

En la unua balot-rondo laŭ lista sistemo la dekstruloj ricevis 53 % de la voĉoj kaj samtempe grandan parton de la individuaj kandidatoj. En la dua rondo ili ĉie venkis krom en tri seĝoj. La nova ĉefministro fariĝis Viktor Orbán, kiu ĉefministris inter 1998 kaj 2002.

Ciganoj

Lia partio rajtas ŝanĝi ĉiujn leĝojn, eĉ la konstitucion, ĉar ĝi disponas pri necesa plimulto. Ŝanĝoj, tamen, ne solvos ĉiujn problemojn. Unu el tiuj koncernas ciganojn. Nova kaj ekstrema partio, Jobbik, kampanjas kontraŭ ciganoj. Orbán nepre solvu la cigano-problemon ĉar, se ne, Jobbik plifortiĝos.

Tamen la plej granda tasko estas solvi la fincan krizon. Laŭ plej freŝaj sciigoj la lando jam iomete eliris la krizon, sed senlaboreco restas alta (11 %), kaj same la internacia ŝuldo.

Orbán havos ankaŭ alian taskon. En la sekva jaro li estos laŭvica prezidanto de Eŭropa Unio. Tial Hungario devas prezenti laŭeble plej bonan profilon al la eŭropaj politikistoj.

Karlo JUHÁSZ

Kontribuojn pri la politiko de via lando sendu al politiko@monato.net

Nova politika erao

Post 60 jaroj Britio havas denove koalician registaron. Tutlandaj elektoj, okazintaj en majo, liveris parlamentan plimulton nek al la reganta Laborista Partio nek al la ĉefopozicia Konservativa Partio. Sekvis kvar tagoj da diskutoj, konjektoj, proponoj kaj kontraŭproponoj, ĝis fine estas anoncote, ke la nova registaro konsistos el koalicio inter la Konservativa Partio kaj la Liberal-Demokrata Partio.

En multaj eŭropaj landoj normalas elektoj, kiuj ne liveras klaran, unupartian registaron. Same normalas koalicioj. En Britio, tamen, jam de pli ol duonjarcento – krom kelkaj neformalaj interkonsentoj – regis landnivele aŭ la Laborista aŭ la Konservativa Partio sen helpo de triaj, pli malgrandaj partioj.

Nur ekzemple en Skotlando kaj Kimrio troveblis en la tieaj t.n. parlamento kaj asembleo koalicioj. Ĝenerale, tamen, britoj ne komprenas, kaj pro nesicio malfidas, koaliciojn. Britoj do nun miras, ke kandidatoj, kiuj akre kritikis unu la alian dum elekto-kampanjo, nur kelkajn tagojn poste kolege kaj kune staras, ŝultre-al-ŝultre, por prezenti komunan platformon al la publiko.

Verda Partio

En la elektoj gajnis la Konservativa Partio kun 36,1 % de la voĉoj 306 parlamentajn seĝojn: necesas 325 por akiri plimulton. La Laborista Partio ŝrumpis kun 29 % al 258 seĝoj. La Liberal-Demokrata Partio kun 23 % rikoltis 57 seĝojn. Aliaj partioj, ekzemple kimraj, skotaj kaj nord-irlandaj, gajnis la aliajn seĝojn. Unuafoje, krome, venkis kandidato de la Verda Partio. Kia kontrasto kun la situacio antaŭ unu jaro, kiam ĉiu



Cameron, subtenata de la liberal-demokratoj, fariĝis la 52a brita ĉefministro kaj la plej juna – 43-jaraĝa – jam de 200 jaroj.

prognozis lavango-venkon por la konservativuloj.

Rimarkeblas, ke mankas proporcia reprezentado en Brito (almenaŭ por landaj elektoj). Ekzemple, la elcentaĵo de la voĉoj por la liberal-demokratoj ne spegulas la relative mizeran nombron de parlamentanoj. Notindas, cetere, ke dum la konservativuloj – kompare kun la lastaj tutlandaj elektoj – pligrandigis sian elcentaĵon de la voĉoj per 3,8 % kaj gajnis tiel 97 novajn deputitojn, la liberal-demokratoj, kies elcentaĵo kreskis je 1 %, perdis kvin deputitojn.

Akre mokata

La rezultoj prezentis dilemon al la estro de la Liberal-Demokrata Partio, Nick Clegg [nik kleg]. Tradicie, tiu ĉi maldekstra-centra partio – parenteze dum jardekoj akre mokata de la du pli grandaj partioj – sentis sin pli komforta kun la teorie maldekstra sed praktike dekstra-centra Laborista Partio. Sed subite ĝi trovis sin svatata de du rivaloj, ambaŭ pretaj kompromisi kaj dolĉigi siajn politikojn laŭ liberal-demokrataj gustoj.

Tamen verdire, pro la malforto de la

Laborista Partio – elĉerpita kaj malpopulara post 13 jaroj da povo, unue sub Tony Blair, laste sub Gordon Brown – Clegg apenaŭ povis trafi alian decidon ol akcepti la manon de la dekstrema konservativa partio estrata de David Cameron [kámeron].

Ministraj postenoj

Tial Cameron, subtenata de la liberal-demokratoj, fariĝis la 52a brita ĉefministro kaj la plej juna – 43-jaraĝa – jam de 200 jaroj. Vicĉefministro fariĝis Clegg. La kabineto konsistas ĉefe el konservativuloj; tamen kvin liberal-demokratoj ricevis altajn ministrajn postenojn.

Tiamaniere, malgraŭ konsterniĝo inter liberal-demokratoj, ke ilia maldekstrema partio kunlaboras koalicie kun dekstra konservativa reĝimo, estiĝas tamen esperoj, ke la partnero-partio bremsos kaj centrigos la ekscesojn de kelkaj en la kabineto de Cameron. Pozitivaj la unuaj indikoj: la konservativuloj akceptis kelkajn politikojn de la liberal-demokratoj kaj promesis esplori pli proporcian voĉdonan sistemon. Ambaŭ partioj konsentis, ke la ĉefa kaj plej urĝa tasko koncernas la malforton de publikaj financoj kaj la ankoraŭ feblan britan ekonomion.

Ŝati kaj aprobi

Britio eniras epokon de necerto. Necerto pri la koalicio – ĉu ĝi kolapsos, ĉu ĝi eltenos – kaj necerto pri la rimedoj necesaj por sanigi la ekonomion. Se la koalicio kune kaj efike solvos la problemojn frontantajn la landon, povas esti, ke britoj lernos ŝati kaj eĉ deziri ĉi tiun novan politikan kunlaborem.

Se ne, la liberal-demokratoj estos sendube kulpigitaj pri la fiasko. La iamaj svatintoj, mielvortaj kaj promesplenaj, fariĝos denove la mokantaj, viplangaj tiranoj de antaŭe: la partio, jam streĉata pro sia iom ŝoka apogo de dekstrema konservativa „malamiko”, estos pistita ĉe la venontaj elektoj en 2015. Tamen intertempe britoj ĝuas – iom nerve – ĉi tiun novan politikan spektaklon.

Paul GUBBINS



HTTP://DAILYCALLER.COM HTTP

Por solvi la problemon la niĝeria parlamento permesis, ke Jonathan fariĝu provizora prezidanto.

La San de majo mortis la niĝeria prezidanto Umaru Musa Yar'Adua, kiun dum la lastaj sep monatoj neniu publike vidis. La 23an de novembro 2009 Yar'Adua vojaĝis al Sauda Arabio pro medicina ekzameno, nek transdoninte la povon al la vicprezidanto, Goodluck Jonathan [gudlak ĝonatan] (kies antaŭnomo signifas „bonŝanco”), nek oficiale informinte la niĝerian senaton (parlamenton), ke li vojaĝos.

Rezultis politika lukto inter subtenantoj de la prezidanto kaj de la vicprezidanto. Eksaj militantoj, kiujn Yar'Adua pardonis post jaroj de bataloj kun la federacia registaro, ĵuris denove ekmiliti, se oni ne transdonos la povon al la vicprezidanto. Por solvi la problemon la niĝeria parlamento permesis, ke Jonathan fariĝu provizora prezidanto. En februaro Yar'Adua sekrete revenis al Niĝerio, sed neniu, krom kelkaj islamaj kaj kristanaj klerikoj, ricevis la permeson de lia edzino Turai viziti la prezidanton.

Nobel-premiito

Dume malvere raportis amaskomunikiloj pri la sanstato de Yar'Adua. Multaj homoj, inkluzive de la sola niĝeria Nobel-premiito Wole Soyinka, protestis kontraŭ la registaro kaj la konduto de la edzino de Yar'Adua. Estis eĉ raportite en januaro, ke la prezidanto mortis. Tiamaniere, antaŭ la vera morto, provis okupi plej altajn registarajn poziciojn politikistoj de la nordaj regionoj.

Premate de la norduloj, la provizora prezidanto fine eksigis la tutan ŝtatan ekzekutivon enpostenigitan de Yar'Adua. Tial ministran postenon ricevis nevo de Yar'Adua.

Jonathan estas jam inaŭgurita kiel 14a prezidanto de Niĝerio. Iama universitata lekciisto, li fariĝis vicestro de Bayelsa-ŝtato en 1999 kaj poste, pro la korupto de la ŝtatestro, ties posteulo. En 2007 Yar'Adua elektis lin vicprezidanto.

Princo Henriko OGUINYE/pg

Vestaĵa verdikto

En pluraj municipoj de Belgio, ekzemple en Antverpeno kaj Gento, jam de multaj jaroj ekzistas leĝo, kiu malpermesas la portadon de vestaĵoj, kiuj malebligas tujan rekonon. Nur dum la tagoj ĉirkaŭ karnavalo la urbestroj

kutimas provizore nuligi tiun malpermeson.

En aprilo la federacia Ĉambro de Reprezentantoj ĝeneraligis tiun leĝon kaj validigis ĝin por la tuta teritorio. Laŭdire Belgio estas la unua ŝtato, kiu tiel malpermesas maskojn en la publika vivo. La propono pri ĝeneraligo venis de la valona partio *Movado Reformisma* (MR) kaj estis preskaŭ unuanime akceptita.

Armilo

La propono estis argumentita plurmaniere. Unue konstateblas ĉiam pligrandiganta krimado fare de maskitaj personoj. Per la nuna leĝo la polico rajtas tuj aresti maskiton kaj ne devas atendi, ĝis tiu efektive elprenos armilon de sub la vestaĵoj. Tiun unuan argumenton ŝajne neniu kritikis, sed la dua argumento vekis pli da emocioj.

MR klarigis, ke persono, kiu portas maskon, „lezas la fratecon”. La partio per tio sekvas la ideojn de Élisabeth Badinter, franca verkistino kaj edzino de eksministro pri justico. Laŭ ŝi la portantoj de masko arogas al si la rajton observi la aliajn, sed ne povas esti mem observataj kaj do kondutas „nefratece”.

Entrudo

Klaras, ke la unua argumento – sekureco – rilatas al la tuta socio, sed la dua argumento – nefraterco – povas esti konsiderata entrudo en la privatan vivon de parto de la islamanoj, nome tiuj, kiuj portas burĥon (eksteran vestaĵon tute kovrantan la korpon, kun malgranda aperturo por la okuloj garnita per reto) kaj nikabon (similan vestaĵon, kiu almenaŭ lasas videblaj la okulojn). Pro tiu dua kialo la nova leĝo en la islama mondo estis tuj

baptita „burĥo-malpermeso”.

Pluraj ekstremismaj islamaj grupoj jam sciigis, ke ili inundos Belgion per atencoj, se la leĝo ne estos nuligita. Iuj eĉ pli forte esprimis sin. Abu Imran de *Sharia4Belgium* diris: „Ni ne dormos, antaŭ ol la islama flago flirtos super la belgaj reĝa palaco kaj parlamento.”

Debatoj

Ankaŭ en la parlamentaj debatoj mem apenaŭ estis diskutata la sekureca flanko de la nova leĝo (kvankam estis menciata, ke en Francio bankŝtelistoj estis vestitaj en burĥoj), sed ĉefe la malpermeso de burĥoj kaj nikaboj en la belga publika vivo. Kiel dirite, ĉiuj partioj apogis ĝin, sed ne ĉiam per la samaj argumentoj.

Bart Somers (flandraj liberaloj) ŝatas la novan leĝon, ĉar ĝi respektas la dignon de ĉiu individuo kaj ne devigas la virinojn tutvive promeni en karcero. Eric Thiébaud (valonaj socialistoj) nomis la malpermeson „pledo por la homaj rajtoj kaj rifuzo neglekti la virinojn”.

Edzinoj

Zoé Genot kaj Fouad Lahssaini (valonaj verduloj) sin esprimis pli nuance. Ili nomis la leĝon superflua. Kvankam ili voĉdonis por la leĝo, ili timas, ke la sola sekvo estos, ke la viroj, kiuj nun devigas siajn edzinojn porti burĥon aŭ nikabon, nun komplete malpermesos al ili forlasi la domon.

Dume estas klare, ke tiu nova leĝo influos ne nur la etan belgan ŝtaton. Multaj aliaj landoj rigardas ĝin kiel teston, antaŭ ol priparoli similan leĝon en siaj propraj parlamentoj.

Paŭl PEERAERTS



Laŭdire Belgio estas la unua ŝtato, kiu tiel malpermesas maskojn en la publika vivo.

Suferas la ĉevaloj

Malsatstrikas membroj de la opozicia albana socialista partio, stariginte tendaron inter la ĉefministrejo kaj la parlamentejo en Tirano.

En la tendaro enfermis sin 200 homoj, inkluzive de 20 deputitoj de la partio estrata de Edi Rama. La malsatstrikantoj postulas, ke oni malfermu balotilulujojn de la elektoj de junio 2009,



BARDHYL SELIMI

La estro de la socialistoj, Edi Rama, promesis anstataŭigi tiujn, kiuj pro medicinaj kialoj forlasis la malsatstriko-tendaron.



BARDHYL SELIMI

La malsatstriko-tendaro situas meze de gravaj registaraj konstruaĵoj en Tirano.

kiam ambaŭ ĉefaj partioj gajnis preskaŭ saman nombron de sidlokoj en la parlamento.

Rezultoj

La Demokratoj, nun regantaj kun socialista frakcio, kontraŭas, dirante, ke la rezulton jam konfirmis la koncernaj juĝejoj instancoj. La Demokratoj timas, ke, malfermite la ujojn, oni trovos, ke la rezultoj de la balotoj estas manipolitaj.

Kelkaj strikantoj jam forlasis la tendaron pro sanaj kialoj. Intertempe la striko damaĝas la reputacion de Albanio en Eŭropa Unio, lezante la aspirojn de albanoj libere moviĝi tra EU. Laŭ popola proverbo: „Kiam la ĉevalistoj kverelas, suferas la ĉevaloj”.

Bardhyl SELIMI



La Deklingva manlibro pri politiko de Stefan Maul helpas vin trovi vian vojon en la politika ĵargono.

**Mendu ĝin de Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio,
butiko@fel.esperanto.be aŭ
www.retbutiko.net kontraŭ 9,50 eŭroj + afranko.**





4



6

En 2009, la Internacia Jaro de Astronomio proklamita de UNESKO, la mondo celebris la 615-jaran jubileon de la elstara sciencisto kaj ŝtatisito Mirzo Ulugbek.

Oriento donacis al la mondo multajn saĝulojn. Iliaj nomoj, kiel steloj, tra la jarcentoj lumas desur la ĉielo de scioj: Al-Ĥorezmi, Abu Rajhan Al-Biruni, Aviceno, Al-Farabi, Omar Ĥajjam ktp. Kaj kiel hela neestingebla lumo inter ili brilas la nomo de sultano Muhamad Tareg Ulugbek. Per la forto de lia talento kaj soifo je scioj, komence de la 16a jarcento formiĝis samarkanda astronomia skolo, kies esploroj kaj malkovroj fariĝis kvazaŭ netakseblaj briketoj en la fundamento de la moderna astronomia scienco.



5

1. Ĉi tie troviĝis la observatorio de Ulugbek.
2. Konserviginta parto de la ĉefa mezurinstrumento en la observatorio.
3. En la muzeo de Ulugbek en Samarkando.
4. Madraso de Ulugbek centre.
5. Maldekstre Madraso de Ulugbek sur la placo Registan en Samarkando.
6. Maŭzoleo Gur Emir ĉi tie estas tombo de Ulugbek.

Estonta reganto de la imperio

Kiu povis supozi, ke al tiu ĉi knabo, naskiĝinta la 22an de marto 1394 en la ĉararo de lia mondkonkerinta avo, estis destinita granda scienca kaj politika misio. Ekde frua infaneco, Ulugbek estis tre scivola knabeto, kiu posedis eksterordinaran intelekton. Kelkaj sciencistoj parolis ankaŭ pri lia mistika talento. Pri tio atestas unu el pluraj legendoj. Foje Amir Timur (Tamerlano) troviĝis en iu konstruaĵo, kiam lin subite alkuris Ulugbek. La sola deziro de la knabo estis tio, ke la avo senprokraste forlasu la ejon. La reganto estis tre surprizita per tia peto de sia nepo, sed li faris tiel, kiel lin petis Ulugbek. Kaj tuj poste komenciĝis tertremo, kiu detruis la konstruaĵon. Tiamaniere Ulugbek eble savis sian avon. Vojaĝante post la militira ĉararo de Timur, la juna Ulugbek multe lernis de sia mentoro Kazi-zade Rumi. La faman scienciston oni konis eĉ ekster la limoj de Maveranar (ŝtato de Timur) kaj nomis „Platono de sia epoko”. Lutage, pretervojaĝante laŭ la teritorio de Irano (Orienta Azerbajĝano), Ulugbek – tiam li estis 8-jara – ekvidis ruinojn de iuj antikvaj konstruaĵoj. Sentinte la scivolon kaj anticipante la demandon de sia lernanto,

la mentoro komencis atentokapte rakonti. Li sciigis, ke tio estis observatorio de la 13a jarcento, kreita de Nasiridin Tusi. Ĝi distingiĝis ne nur per siaj grandegaj dimensioj. En la jaro 1270 la sciencistoj kreis tie astronomian tabelon. Eble tiuj eventoj poste instigis la junan sultanon fondi en sia hejmlando la observatorion, kiu vere memorigas la antikvan observatorion de Nasiridin Tusi. En 1405 dum sia militiro al Ĉinio, Amir Timur mortis en la urbo Otrar (nuna Kazahio). Post tio komenciĝas la porpotenca batalo, kiu daŭris ĉirkaŭ 5 jarojn. Rezulte la potencon akiras la patro de Ulugbek, la kvara filo de Timur – Ŝahruh. Malsame al sia patro, Ŝahruh translokas la ĉefurbon de sia ŝtato de Samarkando al Herato kaj en 1409 nomumas sian 15-jaran filon reganto de Samarkando. Post la morto de Ŝahruh en 1447 Ulugbek fariĝas reganto de la tuta eksa imperio de Timur kaj ĉefo de la dinastio de Timuridoj.

Talenta sciencisto

Jam junaĝe Ulugbek komencis interesiĝi pri scienco. Al tio grave kontribuis ankaŭ la riĉa biblioteko, kolektita de liaj patro kaj avo, kie li pasigas longan tempon. Tie li legis verkojn de

grandaj sciencistoj, kaj studis historion. Sed ĉefe li atentis studojn pri astronomio kaj matematiko. Pri liaj vastaj konoj cirkulis legendoj. Jen kion skribis la plej proksima kunlaboranto de Ulugbek, la matematikisto Gijasinid Kaŝi: „Ulugbek estas granda fakulo pri matematiko. Lia majstreco en tiu ĉi sfero atingis tiun gradon, ke foje dum ĉevalrajdado li decidis eltrovi al kiu tago de la suna jaro korespondas iu dato. Kaj do, sidante sur la selo, li kalkulis la longitudon de la suno kun precizeco ĝis du minutoj de la firmamento”.

Samtempuloj aprezis ankaŭ la fenomenan memorkapablon de sia reganto. La evento, okazinta iun tagon en la palaco, estas unu el la ekzemploj de tiu ĉi talento. Ulugbek estis pasia ĉasisto. En lia biblioteko estis speciala libro, kien dum multaj jaroj estis enskribataj la dato kaj loko de ĉiu ĉasado kaj ankaŭ priskribo de la arkpafitaj birdoj. Dum militiro tiu ĉi libro perdiĝis. La bibliotekisto estis konfuzita, sed Ulugbek trankviligis lin kaj diris, ke li povas rekonstrui la tutan libron laŭ sia memoro. Li tion faris kaj kiam la perdita libro estis trovita, evidentiĝis, ke Ulugbek faris nur 4 aŭ 5 erarojn. Kiel atestis Gijasinid Kaŝi, li estis nesuperebla fakulo pri la korano. Dum ĉeesto de ekspertoj, li povis citi iun ajn ĉapitron el la sankta libro kaj ne fari eĉ unu solan eraron.

Sian tutan potencon kaj riĉon Ulugbek dediĉis al evoluigo de scienco kaj edukado. Li konstruis superajn altlernejojn – madrasojn – en Samarkando, Buĥaro kaj Ĝiĝduvano. Ili estis siaspecaj mezepokaj universitatoj, en kiuj, krom la bazojn de teologio, studentoj studis matematikon, astronomion, filozofion, retorikon kaj aliajn sciencojn. Sed Ulugbek okupiĝis ne nur pri konstruado, sed li ankaŭ prizorgis, ke la edukado estu alirebla al la tuta talenta junularo, eĉ al tiuj, kiuj ne havis monon. Ne malofte li mem lektiis en la madrasoj. Studado en la madrasoj estis senpaga – al plej diligentaj studentoj oni pagis stipendiojn. Kiel atestas Zahiridin Bobur, en la madraso de Ulugbek instruis ankaŭ 14-jara talentulo, instruisto Mullozade, filo de



Madraso de Ulugbek en Samarkando.

Mulao Osman. Sen la persona patronado de Ulugbek tio apenaŭ estus ebla. La talentan knabon oni nomis Mullo-i Madarzod, kio signifas „denaska mulao”. Inter la studentoj estis reprezentantoj de diversaj nacioj, inkluzive eksterlandanojn.

Ulugbek kreis ankaŭ akademion, en kiu membris ĉirkaŭ 100 akademianoj, elstaraj sciencistoj de la ŝtato. Laŭ atestoj de samtempuloj, Ulugbek mem estis rimarkinda kaj multflanka erudiciulo. Krom verkoj pri astronomio kaj antropologio, li aŭtoris historian traktaton *Arbajn ulus* („Kvar uluso”) pri la kvar ŝtatoj aperintaj post forpaso de Ĉingis-Ĥano. Ĝis nun konserviĝis la nomoj de 6 muzikaj verkoj de Ulugbek. Liajn poemojn admiris la elstara poeto Aliŝer Navoi. La fakuloj opinias, ke dum la regado de Amir Timur en la arto kaj arkitekturo dominis monumentalismo, dum la regado de Mirzo Ulugbek dominis harmonio kaj dum la regado de postaj Timuridoj rafiniteco.

El sia militiro al Mogolistano (simbola nomo de orienta Kazaĥio kaj orienta Turkeŝtano) en la jaro 1424 Ulugbek alportis nefritan ŝtonon, kiun oni nomis *Mahtob* („Luna lumo”). Oni rakontis, ke ĝi estis trona ŝtono de Ĉingis-Ĥano. El tiu ĉi ŝtono Ulugbek ordonis fari tomboŝtonon por sia avo Amir Timur. La rare bela „Banejo de Mirzo”, konstruita de Ulugbek, funkciis dum pli ol 500 jaroj. La planko en la banejo estis konstruita el diverskoloraj ŝtonoj.

Ĉefa vivoverko

La naturo malavare dotis Ulugbekon per talento de sciencisto. En li kuniĝis vastega erudicio, fideleco al la ideo kaj celdeterminado en ties realigo. Sed por efektivigo de la vivverko estis necesaj ankaŭ sufiĉaj monrimedoj. Kaj, kiel reganto de potenca ŝtato, li disponis pri ili plenmezure. Tial la astronomia skolo kreita de li estas plenrajte konsiderata kiel ora jarcento de la mezepoka astronomio. La plej grava projekto de Ulugbek – observatorio – estis finkonstruita en 1428-1429 (kelkaj fakuloj supozas, ke ĝi ekfunkciis kelkajn jarojn pli frue) sur

la rokeca monteto ĉe piedo de la altaĵo Kuhak (nuna Ĉupan-Ota) kaj reprezentis trietaĝan rondforman konstruaĵon, kiu estis kovrita per belegaj kaheloj. La loko por konstruado de la observatorio estis ideale elektita. De ties supro estis tre oportune observi la ĉielon. Ulugbek konstruis belegan ĝardenon *Bogi Majdon*, okcidente de la monteto, kie ĝis nun ekzistas samtitola vilaĝo.

La esplorado daŭris samtempe kun la konstruado. Ĉar tiutempe optikaj instrumentoj ne ekzistis, la konstruaĵo mem servis kiel grandega mezurinstrumento – kvadranto, t.e. kvarono de cirklo (90 gradoj). Sed pro la specifeco de situo de Samarkando, ĝi povis esti uzata nur kiel sekstanto (sesono de cirklo). La trietaĝa cilindroforma konstruaĵo (ties diametro egalas ĉirkaŭ 50 metrojn) estis pli ol 30 metrojn alta. Meze lokiĝis la ĉefa mezurinstrumento. Bedaŭrinde, ĝis la nunaj tagoj konserviĝis nur ĝia subtera parto, kiu malsupreniras je 11 metrojn. Ĉi tie oni faris observojn de la suno, luno kaj planedoj de la firmamento. Detalan priskribon de la observatorio ni trovas en la verko de historiisto Abd-ar-Razzak Samarkandi, samepokulo de Ulugbek: „La konstruaĵo estis konstruita same fortike, kiel bazo de potenco kaj oazo

de majesteco. La bildoj de naŭ ĉieloj kaj desegnaĵo de sep ĉielringoj kun gradoj, minutoj, sekundoj kaj sekunddekonaj, ĉielo kun rondoj de sep moviĝantaj astroj, bildoj de senmovaj steloj, klimatoj, montaroj, maroj, dezertoj kaj ĉio, kio rilatas tion, estis pentritaj en la desegnaĵoj admirindaj kaj grafikaĵoj nekompareblaj ene de tiu ĉi nobla konstruaĵo”.

Ĉar teleskopoj tiutempe ne ekzistis, astronomoj faris siajn observojn per angulmezuraj instrumentoj, kiuj servis por eltrovo de situo de la surĉielaj astroj kaj vida distanco inter ili, esprimataj en gradoj kaj minutoj de la firmamento. Instrumentoj en la observatorio de Ulugbek estis la plej perfektaj, kiujn eblis nur tiutempe krei. Uzante ilin, Ulugbek kaj aliaj samarkandaj astronomoj atingis tian precizecon en siaj observoj, kiu restis nesuperebla dum unu jarcento kaj duono.

Ulugbek sukcesis arigi ĉirkaŭ si grandan grupon de junaj sciencistoj. En liberaj sciencaj diskutoj regis la principo, enkondukita de li mem: la ŝtatestro kaj ordinara studento estis egalrajtaj. Ulugbek ne ŝatis homojn, kiuj en sciencaj disputoj konsentis kun li ne pro siaj konvinkoj, sed nur por plezurigi lin.

La sciencistoj rigardis kiel sian



Monumento de Mirzo Ulugbek en Samarkando.

ĉefan taskon la ĝeneralan testadon de ĉiuj donitaĵoj akumulitaj de Ptolemeo ĝis Nasiridin Tusi. La plej grava rezulto de ilia agado fariĝis tiel nomataj „Novaj Guraganaj Tabeloj” (1437). La tabelojn akompanis detala enkonduko, kies unua ĉapitro estis dediĉita al la kalendaroj de araboj, grekoj-sirianoj, persoj, ĉinoj kaj ujguroj, kaj ankaŭ estis komparataj donitaĵoj pri diversaj kalendaroj. Jam en tiu ĉapitro rimarkeblis grandaj konoj de la kompilintoj pri astronomiaj esploroj, faritaj dum multaj jarcentoj sur la grandega teritorio de Mediteraneo ĝis Pacifiko.

La katalogo, enhavanta situojn de 1018 steloj, longe restis la plej kompleta kaj preciza; eŭropaj astronomoj reeldonadis ĝin eĉ post du jarcentoj. En Oriento ili estis uzataj ĝis la 17a jarcento. Ne malpli precizaj estis ankaŭ samarkandaj tabeloj de movado de la suno, luno kaj planedoj. Sen iuj ajn teleskopoj Ulugbek kaj liaj kolegoj sukcesis nekredeble ekzakte eltrovi ankaŭ la longon de jaro (kompare kun nunaj donitaĵoj, ili eraris nur je 58 sekundoj) kaj elkalkuli la koordinatojn de pli ol 600 urboj ne nur en centra Azio, sed ankaŭ kelkaj en Rusio kaj Eŭropo.

Poste partoj de tiu ĉi katalogo subtitole *Ex Astronomicis Observationibus Ulug Beigi, Tamerlani Magni Nepotis* („Astronomiaj tabeloj de Ulugbek, nepo de la granda Tamerlano”) estis tradukitaj en la latinan kaj en 1648 unuafoje publikigitaj en Anglio. Tiam la profesoro de la oksforda universitato John Greaves publikigis ankaŭ la geografiajn tabelojn de Ulugbek.

La vivo de Ulugbek finiĝis tragike. Aldona imposto (*tamga*), enkondukata de li, je ekstera komerco malkontentigis

komercistojn, metiistojn kaj la militistan eliton, kiu subtenis ilin. En 1449 li fariĝis viktimo de konspiro de sia propra filo Abdullatif. Devigita abdiki de la trono, Ulugbek estis sendita al haĝo kaj samtempe oni organizis juĝadon, dum kiu li estis mortkondamnita. La 27an de oktobro 1449 apud Samarkando Ulugbek estis senkapigita. Nun lia tombo estas en la maŭzoleo Gur-Emir, familia tombejo de Timuridoj en Samarkando.

Malgraŭ la meritoj kaj skalo de liaj esploroj, post la morto de Ulugbek scienca agado en la observatorio daŭris tute

gravuroj, kiuj eniris lian libron *Prodrumus Astronomiae* („Antaŭheroldo de Astronomio”) (1690). En 1830 sur la mapo de la luno, kompilita de la germana astronomo Johann Heinrich von Mädler aperis kratero de Ulugbek (Ulugh Beigh). La 8an de novembro 1910 la ruslanda imperiestro Nikolaj la 2a donis sian altmoŝtan permeson al la Rusa Astronomia Societo komenci monokolektan kampanjon „por konstrui monumenton al la granda astronomo Ulugbek”.

Sen ajna troigo eblas diri, ke la observatorio de Ulugbek estis prototipo

de nuntempaj astronomiaj institucioj. Jam nur tio estas lia grandega merito. Li lasis al siaj posteuloj riĉan sciencon heredaĵon, liajn kreaĵojn kaj atingojn de la astronomia skolo kreita de li oni admiras ankaŭ nun en la 21a jarcento. La granda uzbeka poeto-humanisto Aliŝer Navoi skribis: „Sultano Ulugbek, posteulo de granda ĥano Timur, estis reĝo, kiun la mondo ankoraŭ ne konas. Ĉiuj liaj samtempuloj foriris forgesite. Kiu memoras ilin nun? Sed li, Ulugbek, etendis la manon al la sciencoj kaj atingis multon. Antaŭ liaj okuloj la ĉielo alproksimiĝis kaj descendis. Ĝis la fino de la mondo homoj de ĉiuj generacioj skribos leĝojn kaj regulojn desur liaj leĝoj”.

Vitalij kaj Anatolij IONESOV



Ulugbek la tria de maldekstre apud Urania, la diino de astronomio.

nelonge fare de lia disĉiplo Ali Kuŝĉi. Poste la observatorio komencis stagni kaj estis entute perdita, perdita dum jarcentoj. Estas strange, ke laborloko de la reganto, kie li dum jardekoj pasigis tre longan tempon, post lia morto estis forgesita. Multenombraj provoj trovi la observatorion fiaskis. Kaj nur en 1908 la rusa sciencisto Vasilij Vjatkin post kelkajara serĉado sukcesis trovi, laŭ la posedaĵ-dokumentoj de la 17a jarcento, la faman observatorion kaj komencis tie arkeologiajn elfosaĵojn.

Pri la aŭtoritato de la uzbeka sciencisto en la mondo atestas ankaŭ la fakto, ke la pola astronomo Jan Havelius bildigis Ulugbekon en la rondo de la plej elstaraj astronomoj de la mondo sur du

loj foriris forgesite. Kiu memoras ilin nun? Sed li, Ulugbek, etendis la manon al la sciencoj kaj atingis multon. Antaŭ liaj okuloj la ĉielo alproksimiĝis kaj descendis. Ĝis la fino de la mondo homoj de ĉiuj generacioj skribos leĝojn kaj regulojn desur liaj leĝoj”.

**Kontribuojn por la rubriko
Scienco de Monato
kunlaborantoj sendu al
scienco@monato.net.**



SANO

Ridinda kuracilo

Kuracado per ridado, nomata gelototerapio (el la helena *gelos*, ridi), ĉiam pli ofte aplikatas en malsanulejoj. Ridi povas sanige efiki sur korpon kaj menson, helpi sango-cirkuladon kaj flankenigi streĉon.

Verŝajne en ĉiuj lingvoj estas proverboj kaj diraĵoj pri ridado aŭ ride-tado similaj al la angla *keep smiling* aŭ la pola *śmiech to zdrowie*. Certe, ridi alproksimigas homojn kaj kreas simpation, plibonigante homan mem-senton. Ĝi efikas kontraŭ doloroj, esti-gante t.n. hormonojn de feliĉo.

Amikeca

Tial ridado plenumas gravan socian rolon. Homoj gajaj kaj ridetantaj estas pli rapide akceptataj en la socio kaj

pli ŝatataj. Tamen speciale en malsanulejoj ĝi havas apartan signifon. Per ridoj la ejo fariĝas pli amikeca, malpli timiga. Pli agrable pasas la kuracado kaj pli rapide revenas paciento al sia hejmo.

La teorio pri gelotologio devenas de la usona kuracisto Patch Adams, kiu vestis sin kiel klaŭno por gajigi malsanajn infanojn. Alia usona kuracisto, Norman Cousins, aplikis la teoriojn kaj, dum li grave malsanis, telespektis komediojn kaj legis al si humurajn librojn. Post tia terapio pliboniĝis lia sanstato.

Eble utilis apliki ridoterapion en la propra vivo por resti sana kaj sendolora.

Stanisław ŚMIGIELSKI

AŬSTRIO

Eleganta krimo

Vieno, antaŭ gimnazio, februaron 2010. Instruisto forlasas la lernejon. Apud li haltas eleganta aŭto itala kaj elaŭtiĝas italo eleganta. Li demandas pri la vojo al la suda aŭtoŝoseo.

La italo estas, kiel li asertas, kunlaboranto de la konata firmao Armani, kiu produktas altkvalitajn kaj multekostajn vestaĵojn. Bedaŭrinde li perdis sian monon en kazino. Ĉu la instruisto povus doni monon por aĉeti benzinon por la reveturo al Romo?

La instruisto hezitas. La italo havas tri originalajn jakojn de Armani, originale pakitajn. Ili kostus nur 120 eŭrojn. La instruisto donas 100. Pli li ne havas.

Farite! Eleganta viro helpis elegantan viron! Oni ja volonte helpas. Nur poste la instruisto vidas, ke la jakoj estas nur lertaj falsaĵoj. Li perdas 70 eŭrojn. Kaj ne nur en Vieno laboras italaj bubaĉoj tiaj.

Walter KLAG

UKRAINIO

Konga kozako

Ekde 1990 la afrikano Situ Tibjurs, 41-jaraĝa, el Kongo, loĝas en Ukrainio. Li tiom ŝatas sian novan landon, ke li ekdeziris fariĝi kozako, ano de popolo loĝanta en sud-orienta parto de Rusio.

Tial, la 19an de januaro, kiam ortodoksanoj festas baptadon, oni „kozakigis” la afrikanon, mergante lin en freŝan, malvarman akvon.

Dmitrij CIBULEVSKIJ

Reformo fuŝita

Manifestaciis en Vieno 10 000 studentoj kun afiŝoj kaj rubandoj, sur kiuj legiĝis: „Bolonjo for”, „Suben la sistemo” kaj „Pagu riĉuloj”. Kio kolerigis la studentaron?

En 1999 la ministroj de 29 eŭropaj ŝtatoj subskribis la Deklaron de Bolonjo por formi unuecan eŭropan universitatan sistemon. La novaj universitataj gradoj estu bakalaŭro (ses-semestra studado), magistro (pliaj du aŭ kvar semestroj) kaj doktoro (latine *philosophiae doctor*).

Multaj eŭropaj universitatoj transprenis tiun sistemon. Iĝi bakalaŭro en Berlino, magistro en Madrido kaj doktoro en Varsovio – pli-malpli tiel oni imagis la studojn de la nova, moviĝema, multlingva internacia klerulo.

Ĉampiono

Eĉ la nuna aŭstra ministrino por scienco, Elfriede Karl, studis eksterlande, nome en Munkeno, Germanio. Fremdan lingvon tie ŝi ne bezonis lerni. Tamen en subvenciita broŝuro ŝia ministrejo laŭdis edukadan progreson: „Eŭropo kiel tut-

monda ĉampiono”: tiel la titolo de la eldonaĵo.

Sed abundas kritiko. La ĉefredaktisto de la gazeto *Wiener Zeitung* parolis eĉ pri kompleta fiasko de Bolonjo. La problemon kaŭzis, ke multaj universitatoj premas ok-semestran magistran studadon en ses-semestran bakalaŭran studplanon.

Rezulte studentoj pro tempomanko ne povas studi eksterlande aŭ aŭdi nedevigajn prelegojn. Multaj estas eĉ eksigitaj de la universitato pro tro longa studodaŭro.

Kariero

Fiaskas ankaŭ la internacia moviĝemo de la studentoj. Restas lingvaj barieroj. Multaj fakte dubas, ĉu eksterlanda studado kaj kono de fremdaj lingvoj estas ĉiam nepra kondiĉo por profesia kariero. Oni pensu ekzemple pri la filozofo Kant, kiu neniam forlasis sian hejmurbon Königsberg, aŭ pri la fizikisto Einstein, kiu neniam lernis alian lingvon.

Tiurilate rimarkis la iama direktoro por eŭropaj interŝanĝ-programoj, Alfred Posamentier, ke usonaj studentoj ne emas vojaĝi eksterlanden por studi kaj lerni fremdajn lingvojn. Ekzemple, ĉiujare 15 studentoj de la Viena Teknika Universitato iras al Novjorko; alidirekte al Vieno nur ĝis du.

Malgraŭ tio kunvenis en marto en Vieno ministroj pri scienco el 46 ŝtatoj por festi la dek-jariĝon de la Bolonjo-sistemo. Protestis studentoj, okupante prelegejon kaj klopodante bari la enirejon de la konferencejo. Dume estis blokita aŭtotrafiko, kaj ne funkciis tramoj. Protestis ankaŭ politikistoj de la Libereco Partio, kiuj ne rajtis partopreni la konferencon.

Walter KLAG



„Bolonjo-sistemo juĝejen!”: studentoj protestas en Vieno kontraŭ la „kompleta fiasko” de la Deklaro de Bolonjo.

Kompenso rel-ativa

Kompensi pasaĝerojn pro trajn-malfriiĝoj celis la aŭstra parlamento per leĝo aprobita en marto. Tio signifas, ke en la lastaj monatoj amase staras homoj ĉe la ĝiĉetoj de Aŭstraj Federaciaj Fervojoj (AFF). Ĉiam pli da pasaĝeroj – ĉirkaŭ 1000 monate – postulas repagon de sia mono. Tion kaŭzis malfriiĝoj ĉefe en longdistanca trafiko: ĉiu kvara trajno ne akuratas. Tamen nur duono de la plendoj estas validaj.


En mallongdistanca trafiko kompenzon ricevas nur posedantoj de jarbiletoj. Mono estas repagita, se ĉe iu linio dum unu monato pli ol 10 % de la trajnoj malfruas je almenaŭ 5 %. Pasaĝeroj aŭtomate ricevas 10 % de la monata biletprezo. La fervojo ne repagas monon, se ĝi ne respondecas pri la malfriiĝoj, ekzemple okaze de naturkatastrofo.

Rezigni

Alimaniere funkcias kompensoj ĉe longdistanca trafiko. Pasaĝero ricevas 25 % de la biletprezo, se la trajno malfruiĝas je 60 minutoj. Ĉe malfriiĝo de 120 minutoj la repago estas 50 %. Se la malfriiĝo okazas antaŭ la veturkomenco, oni povas rezigni kaj rricevi la tutan veturprezon.

Se la veturo pro malfriiĝo iĝas sensenca, oni povas veturi per alia trajno aŭ ricevi la biletprezo. Ĉe iuj cirkonstancoj la fervojoj pagas ankaŭ taksion aŭ tranokton en hotelo. La celo de AFF en tiu trafikspeco estas atingi 80 % de akurateco.

Evgenij GEORGIEV



Europeana: de Rejno al Danubo

Laretpaĝo www.europeana.eu baldaŭ iĝu nepra startpunkto por ĉiuj, kiuj serĉas kulturen objekton en Eŭropa Unio (EU). Ĝia antaŭulo (ĝis 2009) estis EDL (Eŭropa Diĝita Librejo).

Baza versio de Europeana estis lanĉita fine de 2008. En 2010 kaj 2011 venos du novaj versioj, pli kapablaj kaj pli riĉaj je enhavoj. La projekto estas forte subtenata de EU kaj de Nederlando, kies Reĝa Biblioteko administras la tuton.

Kvankam la kolapso de la komputila sistemo tuj post la lanĉo (MONATO, 2009/03, 14-15) ŝajnis montri la kontraŭon, la respondeculoj opinias, ke Europeana ne estas sufiĉe konata. Efektive, simpla rondemandado konfirmas tion.

Bibliotekoj

La meza eŭropano nenion scias pri ĝi, kaj eĉ fakuloj, ekzemple bibliotekistoj, bezonas iom da pensado por memori, ke ili iam ion aŭdis pri Europeana. Surbaze de enketo, oni nun difinis celgrupon de 19-35-jaruloj: junaj personoj, kiuj ankoraŭ dum jardekoj aktivis kaj tial ricevos prioritatan atenton.

La nuna versio (fakte ankoraŭ test-versio) de la serĉilo havas la simplan nomon „v1.0”. La du postaj versioj ricevos la nomojn de eŭropaj riveroj: en la aŭtuno de 2010 lanĉiĝos pli kapabla versio „Rejno”, kaj en 2011 la (provizore) definitiva versio „Danubo”.

Ciferecaj eroj

En „Rejno” estos propono de minimume 10 milionoj da ciferecaj eroj disponigitaj de ĉirkaŭ 200 kunlaborantaj bibliotekoj, arĥivoj, universitatoj ktp.

Eblos pli bona konsultado per porteblaj komunikiloj. Aliaj novigoj estos precipe teknikaj, nevideblaj por la uzanto sed gravaj por la liverantoj de la informoj.

La postuloj por la versio „Danubo” nun estas publikigitaj. Oni antaŭvidas, ke estonte ankaŭ la uzanto kapablos kontribui al la enhavo. Plej grava celo tamen restas la plurobligo de la serĉeblaj eroj, ĉar la nuna ducento da instancoj estas nur eta frakcio de la tuto, kiu teorie povus disponigi enhavon. Fine de marto 2010 okazis konferenco, dum kiu Europeana-uzantoj povis libere esprimi siajn dezirojn por la estonteco, ne demandante sin, ĉu ĉio teknike kaj finance realigeblas. Inter la petoj estis interalie aliro al datumbazoj, kultura kalendaro kaj kreo de virtuala komunumo, komparebla al Facebook aŭ Ipernity.

Geografia referenco

Interesa estis la ideo aldoni al la objektoj ankaŭ geografian referencon. Antaŭ jardeko tio estis neimagebla. Tamen nun preskaŭ ĉiu ajn per navigilo aŭ Google Earth kapablas facile eltrovi, ke la eldonejo de MONATO troviĝas je 51°12'48" norda latitudo kaj 4°24'34" orienta longitudo.

Kial ne indiki tion ankaŭ por pentraĵo, kies kopio estas montrata per Europeana? Unuavide estas simpla afero, sed post pripensado sufiĉe komplika. Ĉu indiki la referencon de la loko, kie staris la pentristo aŭ de la pejzaĝo, kiun tiu pentris? Aŭ ĉu estu la referenco de la muzeo, kie la pentraĵo nun troviĝas?

Evidente estu antaŭvidataj lokoj por pluraj referencoj, kaj la tuto estu zorge difinita. Ne eblos tuj plenumi la deziron, sed certe tio iam okazos.

Roland ROTSART



Per la retejo Europeana eblos trovi plej diversajn kulturajn kaj aliajn informojn.

KONSTRUADO

Ŝtupoj al malplenaj poŝoj

„**M**armorŝton’ kaj fer’ rompiĝos – sed ne nia am’ perdiĝos” – tiel kantis iu Drafi Deutscher en la jaro 1965, atingante per tiu ĉi ŝlagro unuajn lokojn en la furorlistoj. Intertempe lia famo erodiĝis, sed lia unua aserto montriĝas aktuala prognozo – bedaŭrinde.

Jarcentkvaronon post tiu furorkanto ni konstruigis nian domon kaj zorge atentis la plej aktualajn preskribojn pri varmokonervado kaj daŭrohava kvalito, kaj ni eĉ superis ilin. Pri la fenestroj, la tegmento, la muroj kaj la instalaĵoj ni estis pli bone informitaj ol la metiistoj mem. Kaj ni akiris materialojn tiajn, kiajn ni taksis plej konvenaj por vivolonga elteno, almenaŭ por nia propra esperebla vivolongo.

Mezepokaj turoj

Pri la enira ŝtuparo eksterdoma ni ne longe pensis. Ŝtono estas ŝtono, kaj la vivotempo de ŝtono multe superas

tiun de la homo, eĉ se ni konsideris la ŝtupojn en mezepokaj turoj. Tiuj, pro la malmola sabla ŝtono, enranĉiĝis konsiderinde laŭ la tretspuroj, sed ili eltenis jam pli ol 500 jarojn.

Ĉe modernaj domoj ni ĉiam vidis pompajn, brilajn enirŝtuparojn sen iaj uzosignoj. Do ni ne supozis ian difektiĝon, kiam ni akceptis ŝtuparon el „artefarita” ŝtono, produktata tiam en tuj apuda renoma fabriko laŭ la plej modernaj receptoj, vendata en tuta Eŭropo, kun daŭrogarantio kaj la komento, ke ankaŭ la naturo kreas stabilajn ŝtonojn per kungluado de diversgrandaj ŝtonetoj.

Teknike kungluta

Kiam post malmultaj jaroj ni konstatis ian loziĝon de pluraj platoj de la ŝtuparo, ni kulpigis nur malzorgemon de la jam mortinta masonisto kaj ne plendis ĉe la firmao. La ŝtono mem ankoraŭ aspektis sana. Sed post tiuj ĉi jaroj ni observis rapidan kadukiĝon de la tuta ŝtuparo. Ŝtono devas elteni homan vi-

volongon, ni opiniis, egale, ĉu natura, ĉu teknike kungluta. Ni ja ne postulis jarmilojn, sed almenaŭ la vivodaŭron de meze eltenema ŝtonospeco.

Eĉ nia amo jam eltenis kaj multe superis la aĝon de la ŝtuparo, 18 jarojn – ja tre longa tempo por la nuna pariĝa generacio. Evidente ankaŭ por kelkaj ŝtonospecoj. Printempe ni ŝokiĝis, rimarkante, ke nia domenirŝtuparo, kvankam en la feliĉa stato senkonscia, malhavante psikologian sentemon, geedzajn kverelojn, malsanasekurajn pagegojn kaj afliktiĝojn pri la propra vivofino, do probable senkiale, ĉiam pli disfendiĝis kaj erodiĝis kiel dentaro atakata de troĝuata sukero.

Klimataj kapricoj

Ne estis la sukero, opiniis la fakulo, kiu iam liveris la ŝtuparon kaj nun, post bankroto de la firmao, vivas per lerta ekonomia kromkonstruado. Estas la salo, kiu dissolvas vian ŝtuparon, li fakule verdiktis. Jes ja, en tiu ĉi vintro ni devis kelkfoje salumi la ŝtuparon pro vizitantoj, poŝtistoj kaj propra antaŭzorgo. Sed, ke salo damaĝas ŝtonan ŝtuparon, ni neniam sciis aŭ konsideris. Ekstera ŝtuparo ja devas esti fortika sen aparta dorlotado kaj servi ankaŭ dum vintra vetero kun ĝiaj klimataj kapricoj. Ĝuste tio ja estas ĝia tasko.

La fakulo ne petis pardonon pro la mistakoj kaj mismiksoj de siaj tiamaj inĝenieroj. Li ankaŭ ne sentis sin plu en jura devo pro la damaĝo. Li nur diris tion, kion ankaŭ ni tute nefakule jam antaŭvidis: „Vi ne povos anstataŭigi nur la difektiĝintajn platojn. Tuj rompiĝos la tuto. Vi devos anstataŭigi la tutan ŝtuparon. Mi rekomendas al vi niajn firmaajn posteulojn.”

Kaj ni denove konsternite staras apud nia ŝtuparo, iam firma kaj fiera, metita por la eterno, almenaŭ por nia eterno. Kaj ni bedaŭras ĝin, kaj ni bedaŭras nin. Ĉu junula domo de 18 jaroj ekde nun estu daŭre rekonstruata, kvazaŭ ni posedus ruinon mezepokan? Almenaŭ nia amo ne estas tiom delikata, ke ĝi ne eltenus ankaŭ tian sortobaton. Sed ĉu nia monujo eltenos la antaŭvideblajn atakojn?

Franz-Georg RÖSSLER



Klare videblas la difekta domenira ŝtuparo.

Kuraĝu malobei!



La serio komenciĝis per premiita filmo *Der Die Das* de Sophie Narr [sofi nar]. Por kompreni la titolon, nepras scii, ke en la germana ĉiu substantivo havas gramatikan genron. Ne facilas diveni la genron de vorto, eĉ por denaske germane parolantaj. Infanoj el diversaj kulturoj en la unua lerneja klaso stumblas je tiu problemo. Akre la instruistino demandas ĉe ĉiu vorto: „Der? Die? Das?” La reĝisorino observadis dum pli ol unu jaro kvar infanojn kaj filme dokumentadis iliajn apogojn, klopodojn, penojn, malsukcesojn, kverelojn, suferojn, humiliĝojn. La filmo bonege montras la emociajn ŝarĝojn.

Emocioj

Tamen en plena klasĉambro ne estas loko por emocioj. Ĉiutage la infanoj batalas por akomodo, konformiĝo, laboro, sukceso. Ĉiu batalas solece. La filmo senvorte demandas: Kiel statas socio, kiu sufokas la scivolemon, entreprenemon kaj kreemon de siaj infanoj, ĉar ĝi ne disponigas tempon kaj spacon subteni, stimuli kaj progresigi ilin?

Alia filmo montris kiel nova direktorino ĉe alia lernejo provis ŝanĝi malnovajn kutimojn. Enja Riegel [rigel] forigis murojn por krei lokojn, kie okazis libera lernado. Parte ŝi rezignis pri notoj. Lernantoj mem lernis sin pritaksi kaj atestoj detale priskribis lernadon. Lecionoj laŭ instruplana priskribo okazas nur dum duonjaro.

Dum alia duono la infanoj ĝuas diversajn aktivecojn: preparo de publika teatraĵo, ekskursoj, projektoj. Kreskis la sukcesoj de la lernantoj – kaj samtempe kreskis la konsento de la instruistaro, kiu unue kontraŭis la ŝanĝojn.

Aŭtonomio

Filmo pri „tuttagaj lernejoj”, kie infanoj studas tuttage kaj tie tagmanĝas,

montris malglatan evoluon. Nun oni konsideras tuttagajn lernejojn necesaĵo, por ke infanoj komune ĝuu diversajn edukajn eblojn. Tamen pro la aŭtonomio de la germanaj federaciaj ŝtatoj pri edukado ekzistas malsamaj lernejoj sistemoj.

En la filmserio estis prezentataj lernejoj ankaŭ en aliaj landoj, ekzemple Skandinavio. Dum en Germanio oni elspezas edukocelo 4,8 % de la malneta enlanda produkto, en Islando oni elspezas 8,0 %, en Svedio 6,3 % kaj en Finnlando 5,8 %. Videblis lernejoj ankaŭ en Israelo kaj en Usono. En ambaŭ landoj ekzistas lernejoj, kie infanoj mem organizas sian studprogramon aŭ eĉ havas la rajton maldungi siajn instruistojn. Ĉe la usona lernejo, malgraŭ – aŭ pro – la libereco, 80 % de la lernejoj iras universitaten. La tiea metodo sekvas la naturan scivolon kaj lernmanieron de homoj. Ĝi estigas prudentan ordon per ekzemplodona vera demokratio. Rezultas memkonsciaj, decidkapablaj kaj respondecaj homoj.

Reglamentoj

Leviĝas la demando, kiam en Germanio okazos ŝanĝoj tiudirekten. La respondo: Ne sufiĉas atendi politikistojn. Oni mem agu. La iniciatema direktorino, Enja Riegel, konsilis: „Kuraĝu malobei reglamentojn kaj inĝenie interpretu instruprogramojn”.

La filmoj kaj diskutoj montris, ke necesas alia koncepto, alia socia kulturo. Necesas reciproka respekto kaj estimo. Edukado estas ofte misinterpretata kiel profesia klerigo. Ekonomieca vidmaniero reduktas la edukadon ĝis la postuloj de industrio, komerco ktp, kiuj konsideras nur laborfortojn, ne valorajn junajn homojn. Tamen edukado gravas, ĉar infanoj estas la fundamento de la estonteco.

Jomo IPFELKOFER

Ne nur gelernantoj kaj gepatroj sed ankaŭ sciencistoj postulas bazajn ŝanĝojn en la kleriga sistemo de Germanio. Tamen la respondeculoj rigide rezistas ŝanĝojn kaj defendas edukan strukturon enkondukitan antaŭ 200 jaroj por certigi, ke sociaj klasoj restu apartaj, tiel ke nobelaj, riĉulaj kaj altrangulaj idoj ne kontaktu proletajn infanojn.

Karakterizaĵo de la germana lerneja sistemo estas tre frua kaj ripeta disigo de la infanoj, krome nesufiĉa financado, nekontentigaj rezultoj kaj sociala determineco. UN-komisaro Vernor Muñoz [munjós] taksis la situacion peko kontraŭ la homaj rajtoj: la selekta lerneja sistemo diskriminacias infanojn de malriĉuloj kaj migrintoj kaj eĉ handikapulojn.

Do, en Germanio, je la aĝo de naŭ jaroj, infanoj estas disigitaj en plurajn diversvalorajn klerigajn sistemojn: popollernejo, mezlernejo kaj gimnazio. Handikapuloj kaj tre malbone progresantaj lernantoj estas izolataj en apartaj lernejoj.

Sindikato

Tiu situacio instigis la instruist-sindikaton riski eksperimenton. Ĝi organizis filmserion „La estonta lernejo – ekzemploj de pli bona lernado”. Dek filmoj montris aktualajn problemojn, analizis kaŭzojn kaj montris manierojn, kiel lernejoj povus esti demokrate organizitaj, kaj kiel lernado povus memrespondece kaj efike okazi.

Intervjue pri la grafo de Monte-Kristo

La franca romanverkisto Alexandre Dumas (1802-1870) estas konata ne nur en Francio; liaj romanoj estas tradukitaj en ĉiujn eŭropajn kaj multajn aliajn lingvojn. Mi opinias, ke mi ne troigos, dirante, ke liaj ĉefaj verkoj – *La Tri Muskedistoj* (1844) kun du sekvoj: *Dudek jarojn poste* (1845) kaj *La Vicgrafo de Bragelonne* (1850), *Reĝino Margot* (1845), *La Grafo de Monte-Kristo* (1844-1845) – estas inter la plej legataj libroj en la mondo. Kaj eĉ se vi ne legis ilin, vi certe vidis la filmojn, adaptitajn laŭ tiuj libroj – ne nur francajn, sed ankaŭ rusajn, italajn, usonajn, ...

Mi tenas en la manoj la ĵus aperintan libron de Alexandre Dumas *La Grafo de Monte-Kristo*, kiun esperantigis la franca fakulo pri lingvoj Daniel Moirand. La traduko estas altnivela: la teksto de Dumas estas tre fidele tradukita – kaj samtempe vi tute ne havas la impreson, ke temas pri traduko; la romano estas facile legebla, ĉar verkita en bonega Esperanto.

Daniel Moirand, nun emerito, profesia lingvisto, studis plurajn lingvojn: la anglan, hispanan, turkan, eĉ mongolan; diplomita pri la rusa, hungara, araba, ... Dum multaj jaroj li instruis la rusan lingvon. Li estas aŭtoro de originala esperantlingva krimromano, *Murdo en Esperantujo* (1988, FEL), kaj lernolibro, *Materialoj pri la nuna uzado de la*



Daniel Moirand

akuzativo en Esperanto (1990, FEL). Li tradukis en Esperanton la grandegan verkon de Marko Polo *La libro de mirindaĵoj* (2001, UEA), kaj jen aperis lia traduko de *La Grafo de Monte-Kristo* (2010, FEL). Nun li finpoluras sian tradukon de *1001 noktoj* laŭ la traduko de Antoine Galland.

Mi petis Danielon Moirand respondi kelkajn demandojn.

– Kiam vi esperantistiĝis?

– Kiam mi estis 40-jara. Mi volis scii, ĉu artefarita lingvo povas vere funkcii. Mi studis Esperanton en la lingva fakultato de Provenca Universitato, kie ĝin instruis Michel Duc Goninaz.

– Kiom da tempo vi bezonis por vere bone ekposedi Esperanton?

– Mi bezonis tri jarojn. Sed dum tiuj tri jaroj mi tre multe laboris pri la lingvo. Eblas diri, ke mi trapasis tri etapojn: la unuan jaron mi studis la bazojn de la lingvo; la duan jaron mi multe legis por pliriĉigi mian vortostokon; la trian jaron venis la parolkapablo, libera interkomunikado. La regula legado de esperantaj originalaj verkoj donis al mi grandan vortoprovizon. Certe, al mi multe helpis mia antaŭa lingvistika sperto.

– Mi scias, ke vi multe okupiĝis pri la verkaro de Alexandre Dumas. Tamen en Francio oni ofte konsideras Dumas iomete kiel duagradan verkiston ...

– Mi opinias, ke li estas vere grava verkisto. Oni ne sufiĉe agnoskas lian verkaron en Francio, verŝajne, pro tio, ke li ofte pli-malpli libere pritraktas historiajn eventojn kaj personojn. Sed se multaj eksterlandanoj konas Ludovikon la 13an, Ludovikon la 14an, la kardinalojn Richelieu kaj Mazarini, la reĝinon Margot kaj ŝiajn proksimulojn, la militon inter katolikoj kaj hugenotoj – tio okazas danke al la libroj de Dumas.

Dumas neniam pretendis skribi historiajn verkojn: li verkis romanojn. Krome, Dumas verkas en belega franca lingvo. Li uzas altkvalitan literaturan lingvon. Se vi vere volas pasiigi vian infanon pri legado, donu al li librojn de Dumas!

– Kial vi elektis *La Grafo de Monte-Kristo*?

– Mi retrovis miajn junajn emociojn. Deksesjara, mi traegis *La Grafo ...*, kiu forte impresis min, kaj post preskaŭ 50 jaroj mi decidis traduki la libron en Esperanton. Dumas verkis multajn belajn romanojn, sed *La Grafo ...* estas la plej elstara; neniu alia libro valoras ĝin. Ĉi tie oni trovas la plej interesajn karakterojn, la plej altajn filozofiajn ideojn ... Vi povas relegi ĝin plurfoje, kaj ĉiam vi malkovros ion novan.

– Kiujn ĉefajn problemojn kaj malfacilaĵojn vi renkontis, tradukante *La Grafo ...* ?

– La ĉefa malfacilaĵo – la epoko: la ĉefaj eventoj de la romano okazas en la jaro 1844. De tiam ĉio ŝanĝiĝis: Francio, la vivmaniero, la homoj, la lingvo ... Necesas vere mergi sin en la epokon por bone kompreni la situacion, la karakterojn, la agojn de personoj. Krom tio,

dum 160 jaroj multaj aĵoj, nocioj, institucioj malaperis. Mi laboris per malnovaj vortaroj por trovi la ĝustan sencon de malaperintaj vortoj kaj nocioj.


– En la fino de ĉiu ĉapitro vi klarigas francajn tiamajn realaĵojn – tiuj klarigoj estas rezulto de grandega laboro, eble, same granda, kiel la tradukado!

– Certe, mi devis vere pliprofundi kelkajn temojn. Sed necesas konsideri, ke la esperanta traduko estas ne nur por la francoj – ili ja povas legi la libron en la originala versio! – sed ankaŭ por la internacia publiko. Por ili multaj francaj realaĵoj signifas nenion. Mi esperas, ke tiuj klarigoj ebligas al esperantistoj de diversaj kontinentoj pli profunde kompreni kaj pli bone pritaksi la plej grandan verkon de Alexandre Dumas.

Nina KORJENEVSKAJA

Alexandre Dumas: *La Grafo de Monte-Kristo*. Tr. Daniel Moirand. Eld. FEL, Antverpeno, 2010. 1184 paĝoj. Du volumoj. Ilustrita. ISBN 978 90 77066 43 0.

Prezo ĉe FEL: bindita versio: 79 EUR + afranko; elektronikaj versioj (ePub, Mobi-pocket, PDF): 32 EUR.



La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL

Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen,
Belgio.

tlf. + 32 3 234 34 00
tlk. + 32 3 233 54 33

rete: retbutiko@retbutiko.net
skajpe [fel-monato](https://www.fel-monato.net)
www.retbutiko.net.

Monda akvo fluas en malbonaj direktoj

En rondoj de ekologioj jam delonge estas konata la nocio „ekologia piedsigno”, t.e. la naturaj resursoj, kiujn uzas iu persono. En ĝi estis iom neglektita la akvouzo. Nederlanda sciencisto esploris la tutmondan akvokonsumon kaj trovis, ke senkonscia akvotrafiko pligravigas la akvomankon en multaj regionoj.

La ekologia piedsigno estas la produktiva areo, kiun homo bezonas por produkti la varojn, kiujn li konsumas. La kalkulmetodo fojfoje estas kritikata, sed per ĝi tamen eblas fari proksimuman komparon. Ekzemple mezuma nord-amerikano bezonas 9,2 hektarojn, loĝanto de Eŭropa Unio 4,7 hektarojn, dum afrikano devas kontentigi sin per la produkto de 1,4 hektaroj. La grandaj konsumantoj krome importas gravan parton de siaj bezonaĵoj el aliaj mondpartoj, kie iufoje ne restas sufiĉe da produktoj por la propra loĝantaro.

Nova koncepto: la akvo-piedsigno

La nederlanda inĝeniero Arjen Hoekstra [hukstra] pristudis la fenomenon el alia vidpunkto: la kvanto de akvo bezonata por produkti la varojn, kiujn homo konsumas dum unu jaro. Tiu „akvo-piedsigno” meze atingas 1243 kubajn metrojn, kun denove grandaj diferencoj laŭ la regiono: usonano bezonas 2483 kubajn metrojn, germano 1545 kaj ĉino nur 702. La kvantoj rilatas ne nur al la rekta konsumo en la domo (tio estas preskaŭ neglektinda frakcio), sed precipe al la akvo bezonata por produkti la manĝaĵojn, la maŝinojn, la konstrumaterialojn ktp. Hoekstra kalkulis, ke por produkti unu litron da lakto estas bezonataj 1000 litroj da akvo (i.a. trinkataj de la bovinoj kaj uzataj dum la produktado de la nutraĵoj, kiujn manĝas la bovinoj).

Por produkti unu komputilon necesas 20 000 litroj.

Tiu giganta akvokonsumo estas pri-pensiga afero en epoko, kiam en multaj mondpartoj akvo mankas, sed estas ankoraŭ pli maltrankviliga fakto: la regionoj, kiuj havas akvomankon, emas produkti varojn kun grandega akvobezono, destinitajn por eksporto al akvoriĉaj landoj. Ekstrema ekzemplo estas Aŭstralio, lando, en kiu akvo certe ne troas, sed kiu eksportas viandon, fruktojn kaj vinon en la tutan mondon. Tia lando devus urĝe restrukturi sian ekonomion por ne plu elĉerpi siajn restantajn akvorezervojn.

Konferencoj pri la akvo de Nilo

Alia ekzemplo de neracia uzo estas la akvo de Nilo, uzata por irigacio, fiŝado kaj energiproduktado. Laŭ interkonsentoj el la kolonia epoko (1929 kaj 1959), Egiptio rajtas uzi 87 % de la akvo-fluo de Nilo, dum Etiopio, la originlando de plejparto de la nila akvo, rajtas uzi nur etan parton. La 27an kaj 28an de julio 2009 en Egiptio okazis konferenco, en kiu partoprenis naŭ landoj el la regiono. Urĝe necesas adapti la iamajn interkonsentojn al la aktualaj problemoj: i.a. akvomanko ĉirkaŭ la lago Viktorio (Ugando) kaj inundoj en Sudano pro la konstruo de novaj baraĵoj. Solvon oni ne trovis, precipe ĉar Egiptio nepre volas konservi siajn akiritajn rajtojn.

Okaze de konferenco en Stokholmo



PAUL PERRAERTS

*Por produkti unu komputilon
20 000 litroj da akvo estas
bezonataj.*

pri la tutmonda akvoproblemo (*Stockholm World Water Week*, la 16a-22a de aŭgusto 2009) Hoekstra faris proponon por rearanĝi la akvo-uzon kaj la nutraĵproduktadon en tiu regiono. Eblas produkti nutraĵojn multe pli efike en Etiopio kaj Sudano, ol en Egiptio, ĉar en tiuj landoj la klimato pli taŭgas kaj estas bezonata malpli da akvo. Necesus parte transloki la egiptan agrikulturon al la suda nila regiono. Egiptio estonte devus el tiu regiono importi grandan parton de siaj nutraĵoj kaj redirekti sian ekonomion al malpli akvodependaj sektoroj.

Biokarburajloj

Jam estas konate, ke biokarburajloj el ekologia vidpunkto ne tre taŭgas por anstataŭi la kutimajn energifontojn kaj ke ili forprenas agrikulturan areon, urĝe bezonatan por nutri la kreskantan mondan loĝantaron (*MONATO* 2007/12, p. 16-17). Favorantoj asertas, ke nova generacio de biokarburajloj estos pli efika, sed studoj pri ilia origino sugestas, ke la plej preferataj biokarburajloj estas akvovoraj kaj ofte liverataj de landoj kun limigitaj akvorezervoj. Pli da esploroj necesas por pruvi tion.

Roland ROTSAERT

anoncetoj

Vizitu Ipernity, la socian retejon, kie Esperanto estas unu el la plej ofte uzataj lingvoj. En ĝi kelkaj miloj da Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.iper-nity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete: www.internacia-festivalo.de.

"Naturista Vivo", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provkzemplerio. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Kreu vian propran librokatalogon! Per la Retbutiko www.retbutiko.net vi povas krei librolistojn laŭ via propra deziro! Ĉu libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj verkoj? Tio eblas en la Retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin en www.retbutiko.net!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvin-foje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

mare 38 EUR

aere 43 EUR

rete 12 EUR

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

LA GAZETO

MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO
12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

lagazeto@osiek.org

<http://www.lagazeto.com>

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista
4 numeroj jare + La Krom

ikk@free.fr

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Manuel de Seabra, Kris Long, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Roger Siarri, Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil, ktp.

Abono: 25 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp

MORTO De ARTiSTO

Anna Löwenstein

Juna komika aktoro, Prokulpio, estas nura sklavo, kiam li renkontas Neronon ĉe festo. La du junuloj baldaŭ amikiĝas pro sia komuna intereso pri teatro kaj la artoj. Kune ili esploras la noktan vivon kaj aliajn distraĵojn de Romo, ĝis Nerono, nur 16-jara, estas nomumita imperiestro. Kun lia subteno, Prokulpio iĝas la ĉefa organizanto de mirigaj spektakloj prezentataj al la roma publiko, inkluzive de la amasa ekzekutado de fanatika nova sekto, la kristanoj.

Kaj tamen, ne ĉiam facilas esti amiko de imperiestro...

Anna Löwenstein



MORTO De ARTiSTO

Serio Stafeto n-ro 33

Eldonjaro: 2008

Klasika bindita versio: formato 135 x 205 mm, pezo 714 g,
624 paĝoj, ISBN: 978-90-77066-39-3;
prezo ĉe FEL 20 EUR + afranko.

Kiel e-libro (ePub aŭ PDF): prezo ĉe FEL: 12 EUR.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

